

La lunda spektaklo : Ljuba



De pluraj semajnoj la OKK atendas tiun spektaklon : ĝi neniam estis prezentita esperantlingve, kaj Vera kaj Jomo laboregas por tio. Sed ne certe ili sukcesos pretigi ĝin por nia kongreso. Finfine, la derizo de la du artistoj partopreni estas pli forta ol la malfacilaĵoj. Tiel, dum la kongreso vi povos renkontri Ljuba.

Ljuba, estas bela antaŭnomo de knabino, kiu portas sunon en la koro. Ŝi vivas en eta vilaĝo forgesita de civilizacio. Ŝajnas, ke la tempo haltis ... Tiam, malrapide malrapide, fabeloj renaskiĝas sur la lipoj de Ljuba. Por la infanoj de la lernejo ĉefe, kaj poste por la instruistino, kiu eble bezonas ilin ankoraŭ pli. Iom post iom, la animo trafas

sian celon per magieco de la vortoj. Tiu historio vojaĝigas nin al la Eterna Rusio de hodiaŭ kaj de hieraŭ. Rusaj historioj kaj fabeloj akompanitaj per melodioj kantataj kaj ludataj gitare kaj balalajke de Vera Girard, fabelistino, kaj JoMo, muzikisto. Por ambaŭ esperanta kaj francparolanta aŭskultantaroj.



Pri la bankedo de la senkreduloj

Ni anoncis en la novembra numero de *La Sago*, ke la vendredon 10-an de aprilo, la Departamenta Federacio de Liberpensuloj organizas bankedon. Pro la rilatoj inter multaj esperantistoj kaj liberpensuloj kelkaj membroj el la OKK, membroj de ambaŭ asocioj, proponis esperantaĵojn dum la bankedo. Do, ĵak Le Puil kantos dulingve dum la bankedo !

Atentu ke la nombro da partoprenantoj estas ege malgranda.

Menuo : «Garbure», telero da porkaĵo, bovida kapajo; deserto; vino; kafo - Prezo 15€

Aliĝu rekte al «La Libre Pensée», ĉe Sino Françoise Michel, 29 rue Bastié, 64000 Pau - 05 59 02 66 70



Jam 77 Aliĝintoj - ĝisdatita listo <http://kongreso2009.sat-amikaro.org/>

SIRE Serge 74 *Sillingy*; CARRE Jean-Louis 64 *Lescar*; REDOULEZ Marcel 33 *Cambes*; POMIROL Claudine 33 *Cambes*; DARRIEUX Gilbert 65 *Tarbes*; CARRIEU Françoise 65 *Tarbes*; DUSSENTY Monique 33 *Carbon Blanc*; PASSARELLA Jean-François 34 *Servian*; GUICHET Phil 92 *Colombes*; GIRARD Véronique 75 *Paris*; DECOBERT Jacques 64 *Billère*; TIRCAZES Jeanne 64 *Billère*; LE PUIL Ĵak 18 *Thaumiers*; LE PUIL Armela 18 *Thaumiers*; ANDRIEU André 12 *Villeneuve*; ANDRIEU Paulette 12 *Villeneuve*; MARTIN Guy 22 *Brieux*; LEVEQUE Franjo 22 *St Brieux*; MARKOV Ansofi 78 *Montigny le Bretonoux*; MARKOV Vinko 78 *Montigny le Bretonoux*; MARKOV Vito 78 *Montigny le Bretonoux*; MARKOV Flora 78 *Montigny le Bretonoux*; COMTE Jorgos 11 *Lafage*; 24 ETESSE Ĵani 11 *Lafage*; COMTE Ĵasmin 11 *Lafage*; COMTE Floreal 11 *Lafage*; COMTE Luma 11 *Lafage*; BES Jeanne 34 *St George d'Orques*; BERNARD Francis 48 *Mas St Chely*; BERNARD Monique 48 *Mas St Chely*; BERNARD Celine 48 *Mas St Chely*; FABRE André 64 *Pau*; DUROU Solange 64 *Pau*; GRAVEN Henri 64 *Pau*; HOULGATTE Andrée 75 *Paris*; VAN LANDEGHEM Solange 18 *Bourges*; BANASZEC Evelyne 30 *Calvisson*; KARATZAFERIS Nicolas 30 *Calvisson*; MORIO Andre 18 *Bourges*; MORIO Christiane 18 *Bourges*; DELAGNEAU Roland 6 *Saint Jeannet*; DELAGNEAU Madeleine 06 *Saint*

Jeannet; PINET Thérèse 75 *Paris*; TODOR Rosica *Romania Braşov*; GVERINO Maksimiliano 94 *Vincennes*; SCIBOR Frédéric 64 *Pau*; MARTIN Cécile 64 *Pau*; RODI Simone 24 *St Germain du Salembre*; CARREY Charles 24 *St Germain du Salembre*; DUMOULIN Yannick 17 *Montendre*; DUMOULIN Janine 17 *Montendre*; STAQUET Clémentine 1170 *Belgio Bruxelles*; GUILHAUMÉ Françoise 72 *Le Mans*; HULOT Lucie 91 *Savigny sur Orge*; APCHER Eliane 63 *Billom*; JAGUENEAU Michel 17 *Rouffignac*; JAGUENEAU Christiane 17 *Rouffignac*; MARTOREL Floreal 31 *Donneville*; YVART Jacques 59 *Dunkerque*; ALCALAY Sarah 59 *Dunkerque*; CLEMENT Andrée 13 *La Roque d'Antheron*; SCHRAM Jakvo 2018 *Belgio Antwerpen*; GALLIAN Micheline 22 *Plouezec*; CORGNOU Josette 22 *Plouezec*; LECLERC Jean-Marc 31 *Tournefeuille*; GIRARD Véra 31 *l'Union*; GARSTON Jeanine 31 *Toulouse*; BARRERA I VILA Isaac *katalunio El Prat de Llobregat*; VELA I AULESA Carles *katalunio Barcelona*; MILLA SALDÓN Elena *katalunio Mataró*; SÁNCHEZ Anna Maria *katalunio Mataró*; MACIP I BONET Ferriol *katalunio Barcelona*; MILLA I SALDON Josep Maria *katalunio Mataró*; RODON I MORERA Xavier *katalunio Mataró*; CERISAY Michel 13 *Miramas*; ROUSSEAU Eliane 31 *St Orens de Gameville*; GIZARD Gisèle 33 *Eysines*

Horoj kaj eskursoj

Pri la tuttagaj eskursoj, reveno al la kongresejo :

- je la 17a por Gurs kampo
- je la 19a por Eŭskio

La kongresa Poŝtmarko

En Francio neniam aperis poŝtmarkojn pri Esperanto. Esperantistoj multfoje faris sensukcesajn petojn sen rezulto. Tamen hodiaŭ dank' al novteĥnologioj ni eldonis verajn poŝtmarkojn uzeblej por 20-gramaj leteroj en Francio.



Aliĝi el la tuta mondo

Kiam la aliĝilo aperis en *La Sago*, la OKK ne ankoraŭ sukcesis havi bankkonton. Ĝi tamen ege utilas al la eksterlandanoj por pagi la kotizon. Nun, jen ĝi :

OKK SAT-Amikaro 2009

IBAN-kontidentigilo :

FR75 2004 1010 0115 9981 8B02 236

BIC-bankidentigilo : PSSTFRPPBOR

Por SAT Membroj el nefranclingvaj landoj la kotizo estas 30€ (15€ por la junuloj); por nemembroj 40€ (20€ por la junuloj).

Infana programo

Ĉar aliĝintoj demandis al la OKK «*kio por la infanoj dum la kongreso?*» ni zorgis pri, kaj serĉis volontulojn por infanprogramo. Nun ni ankoraŭ bezonas pliajn volontulojn (Ĉu vi? Ne hezitu proponi helpon al la OKK) sed ni jam povas anonci, ke ni organizos minimume infanaktivadon dimanĉon kaj lundon matene dum la du laborkunvenoj de SAT-Amikaro.

Libroservo

Por certigi provizadon de grupa mendo (pluraj ekzempleroj de iu lernolibro ekzemple) aŭ de io preciza (libro, KoDo, ktp) sendu vian mendon ekde nun rete aŭ poŝte, tiel ke oni kunportu kaj rezervu al vi.

libroservo@sat-amikaro.org